

Por marki la 150-an datrevenon de la naskiĝo
de Johann Martin Schleyer, 3. – Zamenhof kaj Schleyer
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 481, 1981.05.21 & 23

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La du pasintajn semajnojn ni markis la centkvindekan datrevenon de la naskiĝo de Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük, la unua planlingvo kiu funkciis, citante erojn el historia studo, kiun faris Reinhard Haupenthal. Tiun ĉi semajnon, ĉiam el tiu ĉi eseo, ni citas komparojn inter Schleyer kaj Zamenhof. La interesatoj pri la temo sciis, ke la kompletan raporton publikigos Kultura Centro Esperantista en sia Monata Cirkulero, kaj ke skribante al Svisa Radio Internacia, oni povas peti la alsendon de la koncernaj numeroj de la cirkuleroj, kie aperos la studo de Reinhard Haupenthal.

A.- Ekzistas kontaktaj punktoj inter Volapük kaj Esperanto. Efektive, la pioniroj de la frua Esperanto-movado rekrutiĝis el volapükaj rondoj, tio estas el medio jam altirita al la ideo de planlingvo. Estas interese, fine, evidenti la malmultajn konatajn dokumentojn pri la rilato Zamenhof-Schleyer kaj la radikale malsamajn sintenojn de ambaŭ viroj.

Cl.- En sia libro pri sekretaj kaj universalaj lingvoj, la orientalistoj Alessandro Bausani okupiĝas ankaŭ pri la genezo de Esperanto. Surbaze de tiu ĉi ampleksa font-materialo hodiaŭ ni scias pri Zamenhof, ke :

A.- Jam kiel infano li staris sub la impreso de lingva diskriminacio, kiun li spertis kiel judo en la bjelostoka geto.

Cl.- Ke paralele kun lia provo lingve unuigi la diasporan judaron iras provoj de unuiĝo sur filozofia-religia tereno. Pro tio Zamenhof aliĝis al la frua cionisma movado.

A.- Kaj ke lian projekton de 1887 antaŭiris skizoj retroirantaj ĝis 1878. Eĉ tiu vidpunkto ĉi Pra-Esperanto aĝas pli ol la Schleyera Volapük. Jam el ĝi evidentiĝas, ke Zamenhof taksis pli alte la humanismajn emociajn vidpunktojn ol la racie-lingvistikajn.

Cl.- Malsame ĉe Schleyer. Li ne suferas pro la lingva problemoj, sed spertas ĝin analize-observe jen en siaj vojaĝoj tra la multlingvaj landoj de la habsburga monarkio, jen dum sia pastra laboro.

A.- En retrospektiva artikolo akperinta en 1888 Schleyer rakontas hagiografieskan epizodon pri la lingva malfacilaĵo spertita de kamparano de lia paroĥo, kies filo elmigris Usonon kaj kies anglan adreson la patro ne sciis skribi. Schleyer finas sian artikolon per la ĉisekvaj panegiraj vortoj :

Cl.- "Tiam venis al mi la ideo, kiel per forto de fulmo: ho, kiel bele estus, se ĉiuj teranoj anstataŭ la terure komplikitaj, nelogikaj kaj ne praktikaj ortografioj, kiel estas precipe la angla, sed ankaŭ la rusa, pola, sveda kaj germana, posedus komunan alfabeton, regulan ortografion, kaj eble eĉ unu solan ĝeneralan korespondan lingvon. Kiom da ĉagreno, da doloroj, da perdado de tempo kaj mono estus evitataj."

A.- Tre diferenca estis la sperto de Zamenhof, kiel ni scias el lia letero al Borovko kaj el tiu al Michaux. Kiel malsamis la genezo de ambaŭ lingvoj kaj la motivoj de iliaj aŭtoroj, tiel same diverĝis poste iliaj sintenoj al siaj kreaĵoj.

Cl.- Eldoninte en 1887 siajn unuajn lernolibrojn, Zamenhof, en letero de la 27-a de novembro 1887, sin turnis al Schleyer kaj skribis:

A.- "Kiam mi antaŭ 5 jaroj aŭdis pri la Volapük, mi ne forĵetis mian laboron, ĉar la konstruo de la Volapük ŝajnis al mi ne tute praktika... Mi estimas Vian noblan deziron porti utilon al la homaro; kun plena estimo por la aŭtoro de la Volapük', mi laboras **ne kontraŭ** la Volapük, sed **por** la ideo... se la juĝo de l'mondo estos ne decida, la "Lingvo internacia" restos kune kun la "Volapük", kiel du amikoj, kiuj havas **unu** celon en la vivo. Aŭ unu de la lingvoj mortos per si mem, aŭ la homaro havos **du** lingvojn, kaj eĉ tio estos por la mondo multe pli bone, ol resti tute sen lingvo tutamonda."

Cl.- Intertempe la historio faris sian verdikton. Dum estas vero, ke en fragmenta artikolo el la jaroj 1889/90 Zamenhof skribis pri Volapük ne sen ironio kaj sarkasmo, Schleyer en sia pamfleto **Pri la fuŝ-lingvo de Pseŭdo-Esperanto** (1900) iĝas rekte insolenta. Ni citas lin:

A.- "El ĉiuj komparoj kun Volapük kun ties kopiantoj kaj antaŭuloj klare evidentiĝas, ke en Volapük manifestiĝis kaj konfirmiĝis bona genio instiginta al grandaj kaj profundaj lingvistudoj; sed en la sistemoj de ĝiaj imitaĉantoj agis pura arbitro, kaprico kaj la stupida, minora strebo havigi al si renomon aŭ monon. Pro tio ĉi imitaĉoj elkreskis dumnokte kiel fungoj el la grundo de mucidaj cerboj kaj rapide malaperis."

Cl.- Eĉ ĉi vortoj eble kunsonas la amariĝo pro la propra malsukceso. Kiam, en 1905, okaze de la unua kongreso en Bulonjo, Esperanto elproviĝis, Zamenhof memoras pri Schleyer. Poste, en 1911, en Antverpeno, li omaĝas al li okaze de lia 80-a datreveno kaj nomas Schleyer "la vera patro de la tuta internacilingva movado". La tiamaj vortoj de Zamenhof povas resti nia definitiva juĝo pri Schleyer, konkludas Reinhard Haupenthal. Kaj li aldonas:

A.-"La frua malapero kaj posta forgesiĝo de Volapük estas la ĉiefkaŭzo, kial neniam formiĝis ia volapükologio kaj kial, se ne konsideri etajn esceptojn, neniam verkiĝis detala biografio de Schleyer. 150 jarojn post lia naskiĝo kaj 70 jarojn post lia morto, la granda plimulto de la dokumentoj neniiĝis.

Cl.- La restintaj materialoj estos fonto por estontaj esploroj. Jen ilia listo: la arkidiocesa arkivejo de Freiburg gardas la personajn pastrajn aktojn de Schleyer, dum la ĝenerala landa arkivejo en Karlsruhe konservas la aktojn pri lia trimonata enkarceriĝo en la fortreso de Rastatt. Feliĉe konserviĝis liaj 23 taglibroj kiuj registras ekde 1863 ĝis la hieraŭo de lia morto la eventojn de ĉiuj tagoj. Kiel bazo por la historiografio de Volapük ili tamen estas mirige nefekundaj. Kaj restas kelkaj aŭtobiografiaj materialoj kies parto aperos en la nova faka revuo **STUDOJ PRI VOLAPÜK**.

A.- Reinhard Haupenthal finas sian historian eseon per tiu ĉi diro: "Volapük eniris la interlingvistikan nekropolon. Memori pri la mortinto povas jam nur la esperantistoj"

Cl.- Eble inter vi, karaj geaŭdantoj, troviĝas kelkaj, kiuj sin demandas, kial esperantistoj povas havi intereson por eksteresperantaj eventoj kaj kial eĉ planlingvistiko mem estas inda je atento? Al ili ni respondas, ke esperanton mem oni neniam povos historie kaj science klarigi, se oni ne samtempe studas la kompletan interlingvistikan movadon, kie ĝi profunde

enradikiĝis. Tial estas utile, ke fakaj revuoj kiel tiu, kiun projektas Reinhard Haupenthal koncerne studojn pri Volapük, kreĝu kaj alportu konojn, sen kiuj eble esperanto mem neniam eliros el mit-ema pseŭdo-prezentado.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*